

Esperanto-kurso en Senegalo

Prepare al la 8-a Afrika Kongreso de Esperanto

Universala Esperanto-Asocio | UEA

Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj | ILEI

Afrika Komisiono de UEA | AK

Senegala Esperanto-Asocio | SEA

8-a Afrika Kongreso de Esperanto | AKE

De la 26-a ĝis la 30-a de decembro 2022

Thiès, Senegalo | Temo: **Esperanto, ŝanco kaj ne minaco por Afriko**



— SUB AŬSPICIO DE LA KAMPANJO HANS BAKKER —



Enkonduko

Tiu ĉi komuna projekto de UEA kaj ILEI, konceptita de Mirejo Grosjean, komune kunordigata de la Estraro de UEA, la Estraro de ILEI kaj la Afrika Komisiono de UEA, sub aŭspicio de la kampanjo Hans Bakker, celas okazigi preparan Esperanto-kurson de septembro ĝis decembro 2022 antaŭ la 8-a AKE, Thiès, Senegal. Kadre de la projekto estas alvoko al instruisto, kiu deĵoros en Senegal kun stipendio. Svisa mecenato subtenas la agadon. La referenca kurzo por la projekto estas 660 FCFA (XOF) = 1 EUR.

Kursa strukturo kaj tempoplano

La kurso celas funkcii laŭ kvar kvinpersonaj lernogrupoj, do laŭcele 20 homoj devos lerni Esperanton pere de la kurso. Por krei identecon al la kvar grupoj, estas proponate, ke ili nomiĝu laŭ lokaj bestoj, kiuj reprezentas pozitivajn simbolojn de saĝo, kapablo kaj rapideco: la mevoj, la agloj, la gazeloj kaj la zebroj.

La instruado devos daŭri de la 17-a ĝis la 20-a horo ĉiun tagon de lundo ĝis vendredo, ekde la 19-a de septembro. La lernantoj ricevu taskojn farendajn dum la senkursaj tagoj.

Loko: ĉe la esperantisto Lafi Charles Diatta en **Dakaro**.

Semajno 38 (la 19-an de septembro ĝis vendredo la 23-a): unua ŝtupo por la mevoj;

Semajno 39 (la 26-an de septembro...): unua ŝtupo por la agloj;

Semajno 40 (la 3-an de oktobro...): unua ŝtupo por la gazeloj;

Semajno 41 (la 10-an de oktobro...): unua ŝtupo por la zebroj;

Sabaton, la 15-an de oktobro: intensa kursotago por ĉiuj kune kun unu manĝo.

Semajno 42: ferioj; la instruisto povas vojaĝi tra la lando kaj viziti.

Semajno 43 (la 24-an de oktobro...): dua ŝtupo por la mevoj;

Semajno 44 (la 31-an de oktobro...): dua ŝtupo por la agloj;

Semajno 45 (la 7 -an de novembro...): dua ŝtupo por la gazeloj;

Semajno 46 (la 14-an de novembro...): dua ŝtupo por la zebroj;

Sabaton, la 19-an de novembro: intensa kursotago por ĉiuj kune kun unu manĝo.

Semajno 47 (21-an de novembro...): tria ŝtupo por la mevoj;

Semajno 48 (la 28-an de novembro...): tria ŝtupo por la agloj;

Semajno 49 (la 5-an de decembro...): tria ŝtupo por la gazeloj;

Semajno 50 (la 12-an de decembro...) Tria ŝtupo por la zebroj;

Sabaton, la 17-an de decembro: intensa kursotago por ĉiuj kune kun unu manĝo; eventuale ekzamenoj.

La 22-an kaj 23-an de decembro: komuna laboro, preparoj por la kongreso (kongresaj sakoj, ornamado de la kongresejo, afiŝado de ŝildoj ktp.); konversacio kaj kunlaboroj laŭeble ĉiam per Esperanto.

La 26-an de decembro: malfermo de la 8-a AKE.

La unua ŝtupo konsistas el 15 instruhoroj. Same la dua kaj la tria. Entute 45 instruhoroj. Fina rezulto: 20 solidajn novajn esperantistojn.

Kun la instruisto la organizantoj devas decidi pri ekzameno: kiun kaj kiel apliki. Laŭintence ĉiuj ricevu atestilon.

Partoprenkondiĉoj por lernantoj

- La kandidatoj por partopreni la kurson kiel lernantoj devas promesi partopreni regule la aktivecojn kaj fine partopreni la kongreson kiel helpantoj.
- La kurso por ili estas senpaga. Same la kongreso estos por ili senpaga.
- Ili preferinde devas havi bakalaŭran diplomon.
- Devas tiel esti same multe da viroj kiel da virinoj.
- La senpageco okazas kiel kompreno de helplaboro kaj kontribuo en diversaj taskoj de la Esperanto-agado en Senegalo ĉirkaŭ la kongreso.
- Kandidatoj esti lernantoj devas prepari kandidatiĝan sinprezenton. Instrukcioj kaj datoj por tio estos ĝustatempe komunikitaj per la kanaloj de UEA kaj ILEI.

Buĝeto por la kurso

- Kostoj por diskonigo de la kurso ĉe radioj kaj gazetoj en Senegalo = 100 000 FCFA;
- Ĉiutaga akvo: 5000 FCFA (ĉiu venu kun taso aŭ glaso); 12 semajnoj, 5 tagoj: $60 \times 5000 \text{ FCFA} = 300\,000 \text{ FCFA}$;
- Luo de klasĉambro por la sabatoj (tri tagoj): $15\,000 \text{ FCFA} \times 3 = 45\,000 \text{ FCFA}$;
- Manĝoj kaj akvo por 20+1 personoj (lernantoj+instruisto) por tiuj 3 tagoj: $5000 \text{ FCFA} \times 21 \times 3 = 315\,000 \text{ FCFA}$;
- Kretoj, kajeroj, skribiloj kaj aliaj kursmaterialo: 80 000 FCFA;

Sumo 1: 840 000 FCFA ~ 1270 EUR + 10% pro ĝirkostoj ~ 1400 EUR;

- Kompenso por Lafi Charles Diatta por kovri kostojn por disponigo de lia domo: 160 EUR;
- Flugo de instruisto al Senegalo: 600 EUR;
- Ĉambro, loĝejeto kun kuirejo: $200\,000 \text{ FCFA} \times 4 \text{ monatoj} = 800\,000 \text{ FCFA} \sim 1220 \text{ EUR}$;
- Mono por unumonata manĝado mempreparita: $15 \text{ EUR} \text{ tage} \times 30 \times 4 = 1800 \text{ EUR}$;
- Monata stipendio por la instruado por kovri aliajn kostojn: $100 \text{ EUR} \times 4 \text{ monatoj} = 400 \text{ EUR}$;

Sumo 2: 4180 EUR + 10% pro ĝirkostoj ~ 4600 EUR;

FINA SUMO DE KOSTOJ: 6 000 EUR.

Elekto de la instruisto

UEA kaj ILEI starigas ĵurion el 7 personoj, kiu diskutos per la reto kun la instruisto, kiu pretas labori instruante en Senegalo dum 4 monatoj laŭ la strukturo de la kurso prezentita en tiu ĉi dokumento. Membros en la ĵurio: Ahmad Reza Mamduhi, prezidanto de ILEI; Alessandra Madella, vicprezidanto de ILEI; Jeremie Sabiyumva, estrarano de UEA pri Afriko; Elisée Byelongo Esheloke, kunordiganto de la Afrika Komisiono de UEA; Mireille Grosjean, aŭtoro de la projekto; Assane Faye kaj Lafi Charles Diatta, gvidantoj de la SEA. Okaze de sinprezento de pluraj kandidatoj la ĵurio elektos unu el ili. Observantoj (kaj laŭbezone anstataŭantoj) estos Fernando Maia Jr, vicprezidanto de UEA, respondeca pri Landa Agado, kaj Adjévi Adjé, sekretario de la Afrika Komisiono de UEA.

Starto kaj komunikado

La projekto estis konceptita inter januaro kaj februaro 2022. UEA kaj ILEI startigos la laborojn en marto 2022 kaj gastigos la informojn pri la projekto en siaj retpaĝoj kaj vaste komunikos per siaj kanaloj. La ĵurio decidos pri limdatoj por akcepti kandidatojn kaj anonci rezultojn.

Referencoj kaj ligiloj

UEA | <http://uea.org>

ILEI | <http://ilei.info>

Afrika Komisiono de UEA: konsisto | https://uea.org/asocio/komisionoj/afrika_agado

Afrika Komisiono de UEA: paĝo | <https://www.esperanto-afriko.org>

Kampanjo Hans Bakker: <https://uea.org/gk/967>